

& Verda Ĉapo:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 481 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Gianfranco Molle. Baladigis Martin Strid per nova rekantaĵo kaj modifo de melodio de Sigurda balado, Norda Kantaro #4401.>

(#Melodio:

<:37> (

/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; La3La LaTi LaSo SoSo; SoSo SoSo LaSo do; do mire do dodo Ti La a)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 Estis foje Ĉapo Verda, ; bona knabo, multe lerta, ; diligenta novlernanto ; de la lingvo Esperanto.

(×:; **Zorgojn mi foje forgesas ; Mi pri saĝo ne promesas ; kaj malgajon venkis mi ; Tion mi ĝoje konfesas.**)

'2 Dum li iras al la grupo ; renkontiĝas kun la lupoj ; deĵoranto sub servuto ; de la Brita Instituto,

'3 por la svingo kaj la lek' ; de la flago "junjon-ĝek"! ; Kun oksforda tono diras ; la lupeg': "vi kien iras?"

'4 "Al la kurs' konversacia ; de la lingv' internacia, ; kaj neŭtrala kaj facila, ; por la tuta mond' utila!"

'5 - tuj respondas Ĉapuleto ; kun en man' verda libreto; kaj, ĝentile salutante, ; al la klub' ekiras lante.

'6 Sed la lupoj pli rapide ; ĝin atingas, kaj perfide ; ruze trompas l' instruiston, ; kiu perdas la ekziston

'7 formanĝita unuglute ; de la lupoj, kiu tute ; tuj kamuflas sin simile, ; kaj atendas tre trankvile.

'8 Tok! Tok! Venas Ĉapo frape, ; kaj li haltas mire, gape... ; "Kiel grandaj la okuloj!" ; "Por kontrolo de l' reguloj."

'9 - diras lupoj sen ŝanceloj. ; "Kiel grandaj la oreloj!" ; - Verda Ĉap' insiste provas. ; "Tiel aŭdi bone povas

'10 mi pri kaz' akuzativa." ; Verda Ĉapo plu naiva: ; "Kial estas buŝ' enorma, ; kiel granda pordo forna!"

'11 "Por vin manĝi ja pli bone!" ; Kaj la lupoj, senpardone, ; salte kaptas Verdajn Ĉapojn, ; manĝas korpon, manĝas kapon.

'12 Lin englutas dumminute, ; lin kruele voras tute, ; ŝiras, maĉas lin kun krakoj, ; ĝis pleniĝo de l' stomako.

'13 Kaj post tiu entrepreno, ; la lupeg', sen ia ĝeno, ; vivis longe dumjarcente, ; tre feliĉe kaj kontente.)